

La plej malĝusta lingvo en germana laborejo estas la Germana

La 'angligado' de la Germana lingvo ĉiam pli disvastiĝadas. La aviada kompanio *Lufthansa* konforme disciplinigas siajn dungitojn. Kontraŭ tio procesas inĝeniero antaŭ tribunalo. Ĉar *Peter Vogelgesang* ne plu povis kaj ne plu volis elteni, ĉiam observi la "time frame" por ne *overshoot* la *alert line*. Kiel diplomita inĝeniero ĉe germana entrepreno, tiel li opinias, li rajtas paroli germane kun siaj kolegoj. Li ankaŭ ne komprenas, kial 'ĉiutagaj banalaĵoj' en oficinterna korespondado estu nomitaj per anglaj fremdvortoj.

Pro tio li ripete ŝanĝis la 'lingvajn anglajojn' en la administrataj tekstoj per germanaj vortoj. Tial lia dunganto, la *Lufthansa Technik AG* en Frankfurto oficiale admonis lin kaj avertis maldungon. Por tion pravigi, oni diris ke la entrepreno ne povis toleri en tiom sensiva sekureckampo 'tiuspecajn manipuladojn'. *Vogelgesang* procesis kontraŭ tiaj 'disciplinigitaj provoj' ĉe la Frankfurta laborjuĝejo. Samtempe li konsultis *Walter Krämer (Münster)*, kies 'Asocio por Konservado de la Germana Lingvo' (en *Dortmund*) antaŭ ĉio kontraŭbatalas la ĝeneralan akcepton de anglaj nocioj dum la ĉiutaga vivo en Germanujo. Profesoro *Krämer* estis tre indignita. "La afero fakte nun atingas la punkton, ke tiu, kiu parolas germane, devas timi esti maldungita! La Germana *Lufthansa AG* denove montris sin kiel antaŭmarŝanto de internacia lingva sklavigado", diris la sciencisto al la Germana Preseja Agenturo (*dpa*). Jam antaŭ la sciigo pri la afero *Vogelgesang*, lia asocio estis brulstampinta la flugkompanion 'lingvokripliganto', pro ties anglalingvaj kapricoj. La *Lufthansa Technik AG* riproĉas al *Vogelgesang* klaran ofendon kontraŭ la deĵor-reglamento, en kiu estus reguligita -sen iu ajn dubo- la 'uzado de specifaj fakesprimoj'. Liaj tradukoj - ekzemple por planeoj = *Tragflächen* (germanlingve) anstataŭ *wings* (angle), kaj por maŝino = *Triebwerk* (germane) anstataŭ *engine* (angle) - kondukus al 'aldona elspezo da tempo kaj laboro', ĉar la germanaj nocioj ne estus troveblaj en la 'oficialaj labordokumentoj'. La fakterminoj uzitaj de la maŝinkonstru-inĝeniero ne estus konforma al 'la normo de konservada entrepreno por aviad-ilaro'. Se tiaj kaj aliaj 'manipuladoj' en la semajnfinaj raportoj de la ĉefdeĵoranto ne ĉesus, oni 'konsiderus finiĝon de la dungokontrakto'.

Laŭ vidpunkto de la tiel riproĉadmonita *Vogelgesang* la uzado de la anglaj vortoj, tradukitaj de li, 'ne estus necesaj' en Germana entrepreno. La 'anglalingva imponkonduto' nur kontribuas al 'ĝenerala konfuziĝo', precipe ĉar ne temas pri veraj fakterminoj sed pri 'tute banalaj konstrupartoj de aviadilo'. La de *Vogelgesang* elektitaj germanaj vortoj estus ĉiuj 'tute kutimaj', kaj tial tio ekskludus iu ajn prokrastiĝon de la ĉiutaga laborproceso.

La entreprenkonsilio de *Lufthansa* plene apogis la dungiton. Interkonsento ĉe la laborkortumo en Frankfurto tamen fiaskis. La dato por la nova proceso estas fiksita por printempo 1999, sub juĝeja dokumento 14 Ca 4204/98. (Fonto: *dpa* en *Werra-Rundschau* 1998-11-28)

Senlingva interkompreniĝo

"point it" Traveller's language kit
(Montru per fingro - Lingva ekipaĵo de vojaĝanto)
Dieter Graf Verlag, 1999, 64 paĝoj, 13 x 9,3 cm,
DEM 9.80 (EUR 5.02) ISBN 3-98031-30-2-6



"Se en fremdaj landoj helpas nek manoj nek piedoj por komprenigi sin, 'point it' povas esti valora helpo. La malgranda vojaĝbildvortaro entenas 1200 fotojn, kiuj prezentas la plej gravajn bezonojn de vojaĝantoj. Tiel ĝi fariĝis 'klasikulo' por turistoj en plej foraj anguloj de nia Tero kaj avancis kvazaŭ kultobjekto de la ĉiu taga dezajno".

Laŭ tiuj vortoj aperis en loka gazeto (*Werra-Rundschau* 1999-04-25) varbanonco por eta libro, je kiu leganto tuj akriĝas la orelojn: 'Lingva ekipaĵo de vojaĝanto!' Eble venis sur la merkaton la sopirita solvo de la monda interkompreniĝproblemo, kiu tiom akre malhelpas la ekeston de Eŭropa identeco!

En la enkonduko por la sesa (!) eldono 1999 legiĝas en helblua, maldika, brilkartonita eta libro kun kovrilpaĝa desegno de mano, kiu etendiĝas al kokid-rostato, en la kvar lingvoj Angla, Franca, Hispana kaj Germana: "Point it" estas libro en poŝformato, kiu estas komprenebla de ĉiuj homoj en la mondo. Ĝi helpas al vi, vin komprenigi aŭ kompletigi viajn lingvokononjn ankaŭ for de turismaj vojoj. Vi simple montru sur bildon kion vi bezonas - bildojn ja ĉiu komprenas! Ĉirkaŭ 1200 objektoj estas elektataj por la libro, kiu baziĝas sur la aŭtoraj vojaĝspertoj en ĉiuj kontinentoj kaj kiu intertempe pruvigis taŭga centmilofoje. Bonan vojaĝon kun "point it"!

La kritikoj en aliaj ĉiutagaj gazetoj ŝajnas favoraj. *Frankfurter Allgemeine Zeitung* ekzemple skribis: "Krom dentobroso, pasporto kaj kreditkarto 'point it' devas esti standardekipaĵo por ĉiu vojaĝanto", dum la *Volkskrant* en Amsterdamo diskonigas la enhavon de la poŝlibro: "Dieter Graf, arĥitekto kaj fanatika vojaĝemulo fotis por la libro duonon de siaj mastrumajoj."

Mi nur povas diri al prospektiva aĉetanto: provu mem!! Aĉetu la sen-vortan vortaron! La ridado dum tiuspeca interkompreniĝprovo tuj solvos ĉiujn problemojn 'per si mem' - sed mi forte dubas ke estiĝos vera interkompreno.



R. Sachs